Negende Jaargang, Nummer 1 Verschijnt maandelijks 9 Jan. 1937

LABORISTA ESPERANTISTO

ARBEIDER ESPERANTIST

ORGAAN VAN DE FEDERATIE VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL

Redactie: Middenweg 226, Amsterdam-O. || Secretariaat van de Fed. van Arbeiders-Esperantisten: Postbus W 6, Amsterdam-W.
Administratie: Postbus O. 50, Amsterdam-O. || Postgiro Amsterdam 144698. || In België: Esschenstraat 16, Antwerpen

Abonnementsprijs f 0.75 per jaar. Voor leden gratis. Oplaag 7500 exemplaren.

NAAR DE TOEKOMST.

Een terugblik in het pas verscheiden jaar, door de bril van den esperantist kan niet anders dan hoopgevend zijn. Heeft het, de cultuur vernietigende, barbarisme in meerdere landen ook de esperantobeweging getroffen, haar ten onder brengen bleek niet meer mogelijk. De vrije ontwikkeling in verscheidene andere landen, waar Esperanto een plaats in het culturele leven der volken gaat vervullen, behoedt haar voor ondergang. Want, inderdaad schrijdt die ontwikkeling zienderogen voort. Hier meer, daar minder, maar een feit is, dat overal, sinds een tiental jaren vooral, de belangstelling voor Esp. groeiende is. Ondanks de beklemmende crisis mocht onze Federatie zich in groei en bloei verheugen. Vermelden we slechts, dat sinds 1927, toen onze Federatie 75 leden telde, wij steeds in ledental stegen en in 't afgelopen jaar met een toename van ruim 600 leden op 4586 kwamen. Deze groei weerspiegelde zich ook in ons werken. Hoe het de andere Esperanto-organisaties verging, hebben zij die ons orgaan regelmatig lazen, eveneens kunnen volgen. Nationaal en internationaal beleefde ook de esperantobeweging haar interne stormen, die de gemoederen beroerden, maar de activiteit niet schaadden. In vele landen, waar men sinds jaren gewoon is regelmatig bijeen te komen, waren de congressen hoogtijdagen, van een steeds toenemend aantal deelnemers. Internationale congressen vinden er al sinds een dertig jaar plaats, waar honderd- en duizendtallen uit tientallen landen, die zich anders niet verstaanbaar konden maken, elkaar ontmoeten. Tegenstand verkeerde in sympathie en de koningin der aarde, de pers, werd ons meer en meer ter wille; een zeer belangrijke factor in onze propaganda.
Dit jaar vieren wij het vijftigjarig bestaan van Esperanto.
Een periode van onvermoeibare activiteit wordt hiermede afgesloten. Vragen wij ons af, wat in een halve eeuw bereikt is, dan luide ons antwoord; de erkenning van Esperanto, als internationale taal. Zeker, niet zó, dat men Esperanto algemeen als zodanig reeds toepast. Doch zelfs het verbod om Esperanto te gebruiken of te verbreiden, houdt een erkenning in van haar waarde. Een zaak die vijftig jaar aan aanhang wint, wacht alleen nog maar op algemene aanvaarding. Dat kan wat langer duren of wat korter, komen moet het. De esperanto-beweging is reeds te wijd vertakt en te zeer met enthousiasme gedragen door allen die haar kennen, dan dat niet vroeg of laat haar invloed zich zal doen gelden.
De komende halve eeuw zal het ons leren. Wij bouwen aan de toekomst, waarvoor wij belangrijk en onmisbaar materiaal aandragen. Dat wij die toekomst nooit voltooid zullen aanschouwen, daar die in de eeuwigheid besloten ligt, mag voor ons geen reden zijn haar niet te helpen vervolmaken, vermits de bouwers in 't verleden hiervoor reeds de fundamenten legden.

IETS OVER GENT.

Het is dus in Gent, dat het 22e Congres der Federatie plaats vindt.
Weinigen van de kongresontoj kennen Gent, daarom achten wij het gepast iets te vertellen over de Arteveldestad van vroeger en nu.
Reeds in de geschiedenis heeft Gent beroemdheid verworven door het krachtig en moedig strijden harer zonen tegen al wat verknechting en vrijheidsroof was. Zo bijv. weigerden zij de zeer hoge belasting te betalen, hen door Keizer Karel opgelegd. Als straf voor die weigering werd hen bevolen blootshoofds, in hun hemd en met een strop om de hals, door de stad te trekken. Vandaar de liefelijke naam „stropdragers", die, hoewel niet zeer welluidend, een naam is gebleven, waarop elke Gentenaar fier is. Het zeer strenge optreden van Keizer Karel, waarbij hen alle vrijheden werden ontnomen, bracht een periode mee van verval en moedeloosheid en Gent heeft nimmer meer de bloei en voorspoed gekend van de glansrijke periode der gilden.
Het huidige Gent is er een van handel en nijverheid, als gevolg daarvan behoort het grootste gedeelte der inwoners (220.000 ongeveer) tot de arbeidersklasse. Een bewijs van durf en totaal negeren van de vroeger heersende macht, is het vestigen van de eerste textielfabriek in de oude machtige burcht, gelegen in het hart van de stad en er op neerziende als zinnebeeld van macht en middeleeuws despotisme. Door de uitbreiding van deze nijverheid werd de burcht te klein en ontstonden de eerste fabrieken. Naast de textielnijverheid zijn er ook nog de metaalnijverheid en machinebouw, die de bron van welstand vormen der stad. Gent is eveneens de tweede havenstad van België.
Onze stad mag zich verheugen in een druk bezoek van toeristen, en werkelijk, wie enigszins oog heeft voor het mooie, moet bekennen, dat de oude hoekjes van Gent, de Graslei bijv., met zijn prachtige kanten gevelrijen, iets enigs zijn en het bezoek waard. Als tegenhanger van deze oude getuigen van roem en rijkdom, hebben wij ons mooi aangelegd stadspark, waar de wereldberoemde Floraliën om de vier jaar plaats vinden, en wiens aanleg een lust is voor het oog.
We hopen dat vele FLE-anoj naar Gent zullen komen, niet alleen ter wille der bezienswaardigheden der stad, maar opdat het 22e congres alle vorige nog overtreft.


703183-D 9 1937

Raporto pri la Federacio en la jaro 1936.

KVARONJARCENTO.

En 1936 la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo festis sian 25-jaran jubileon. Estis jaro por esplori la historion de nia organizo. Ni rajtis turni nin por rigardi en la pasinton. Kvaronjarcento pasis. Jaroj transformiĝis por nia Federacio en formon de konkretaj faktoj, kiuj atestas pri grava pionira laboro. Sendube multaj ankoraŭ subtaksas ĝin kaj ne atentas nian organizon. La publiko nur vidas organizon kun tiom da anoj kaj ne komprenas ĝian signifon. Malfacila estas la tasko, kiun nia Federacio devas plenumi. La postuloj multfoje superas tiajn de ĝeneralaj organizoj, asocioj kaj unuiĝoj.
La jaro 1936a estis grava jaro. Tiucele la Federacio eldonis Jubilean Libron.

DUM LA JARO 1936.

Esperanto progresas. La politika kaj ekonomia ĥaoso en la tuta mondo ne povis malhelpi la evoluon de Esperanto. Bategoj trafis ĝin. Esperanto-organizoj malaperis pro perforta kontraŭstaro. Atakoj ne ĉesis ankaŭ ne en la nederlandlingva regiono. Internaj kvereloj en la esperanto-movado ĝenerala malfavoras al harmonia kunlaboro. Sed malgraŭ ĉi ĉio nia Federacio kreskis.
Dissplitigaj klopodoj estis sukcese kontraŭstarataj. Misinformojn pri nia organizo ni ĝustigis. Tiu cetere negativa laboro forrabis multe da tempo. Sed spite tion, la pozitiva laboro en nia Federacio estas altnivela. Honoron al ĉiuj, niaj laborantoj, kiuj okupadis sian postenon kun tiom da sukceso. Sindono kaj laboremo vivas en nia organizo. En la esperanto-movado efektive ne regas ĉie harmonio. Ofte la ondoj en la esperanto-lago vigle moviĝadas kaj ŝajnis kvazaŭ ili minace alruliĝis al ni. Sed senlace niaj laborantoj daŭrigis sian laboron kaj plifortigis la digon, kontraŭ kiu la minaĝantaj ondoj brue dispartiĝis.
La kresko de nia Federacio sane daŭris. Tamen ĝi ne estas tiel grava kiel en la antaŭa jaro.
Ni ankaŭ turnis nian atenton al la instrua flanko kaj sendube jam donis gravan subtenon al tiurilataj klopodoj per eldono de studgazeto „La Progresanto” k.c. Sed ankaŭ la eduko de gvidantoj postulas tempon kaj energion. Konsiderante la multajn problemojn, kiuj diversflanke prezentas sin, la kresko de nia Federacio en la jaro 1936 rajtigas nin fieri pro la sukcesoj.
Ni kiel laboristaj esperantistoj neniam rajtas esti kontentaj antaŭ ol ni en la ĝenerala laborista movado plene estos sukcesintaj. La Federacio ankaŭ sur tiu tereno grave influis kaj ne estas imagebla sukcesplena laboro por tiu celo sen la pasinteco de la Federacio; sen la aktiva laboro de ĝi. Ni sukcesis plifortigi nian organizon. Tio signifas paŝon antaŭen al nia celo. Ne nur gravas pro konsideroj pri la organiza flanko sed ankaŭ pri la enpenetro de Esperanto en la oficialaj instancoj. Pli kaj pli ni sukcesas ŝanĝi la indifirentecon de la publiko kaj ni konstatas intereson pri niaj klopodoj kaj laboroj. En la sindikata movado; por esperanto en la lernejo; rilate aplikon de esperanto en la internaciaj interrilatoj; ĉiuflanke ni povis konstati vekiĝantan intereson pri esperanto. Tiurilate ni eĉ ne malŝatas kritikon; esprimoj de dubo pri uzebleco de Esperanto pri ĝia disvastiĝo estas signoj de interesiĝo. Nu, ni kapablas refuti per praktikaj pruvoj ĉian dubon, ĉiujn asertojn pri nepraktikeblo de Esperanto.

NOVAJ SEKCIOJ.

Fondiĝis en la jaro 27 novaj sekcioj. En la antaŭa jaro fondiĝis 37. Montriĝis, ke la novaj sekcioj bezonas multan helpon diversflanke kaj ankaŭ spertajn helpantojn kaj gvidantojn. Tamen ĝenerale montriĝis, ke la novaj sekcioj en la antaŭa jaro fonditaj havis la necesan forton por venki la unuajn malfacilajn influojn. Estas ja fakto, ke post la fondiĝo oni ne enskribas novajn aliĝintojn. Por tio oni devas atendi ĝis sekvonta kursofino. Tamen eventualajn eksiĝojn oni ne povas eviti.
Apartenas al la distriktoj atenti ĉi flankon kaj doni senecese la bezonatan subtenon kaj helpon al tiuj sekcioj, kiuj baraktas en la malfacilajoj. En la distrikto N-Holando la sekcioj Uitgeest kaj Schermerhorn anoncis sian malfondiĝon. La distrikto ankoraŭ pritraktas ĉi aferon. Rilate Schermerhorn ĝi sukcesis ordigi la aferon tiel, ke la sekcio restis, pri Uitgeest tamen ĝi ankoraŭ ne trovis kontentigan solvon.
En la distrikto Z-Holando la sekcioj Barendrecht, Gorinchem, Boskoop kaj Leiden 2a malfondiĝis. La anoj el la sekcioj Barendrecht aliĝis al sekcio R'dam 2a kaj el Leiden 2a al Leiden 1a. En la aliaj lokoj la resp. distriktoj havas kontakton kun la restintaj anoj, pro kio denova eklaboro en tiuj lokoj eblos.
Novaj sekcioj fondiĝis: Winterswijk, Rotterdam 15, Breda, Hago 9, Oudenhoorn, Antwerpen-Kiel, Drachten, Bolsward, Terneuzen, Schagen, Lekkerkerk, Appelscha, Zuilen, Hoboken, Leiden 2, Rotterdam 13, Meppel, Utrecht 2, Haarlem 3, Eibergen, Hago 10, Winschoten, Gouda 2, Halfweg, Oude Pekela, Nijmegen kaj Souburg.
En Rotterdam malfondiĝis malnova sekcio 8, kiu do estas anstataŭita per novfondita sekcio, same en Hago malfondiĝis sekcio 8, kies numero do nun vakas.
En la fino de la jaro 1935 ni havis 132 sekciojn, fondiĝis en la jaro 1936 entute 27 sekcioj, malfondiĝis 7 sekcioj. La nombro de niaj sekcioj do altiĝis ĝis 152.

Membronombro.

Fine de la jaro ni nombris: (inter krampoj la ciferoj pri 1935)

sekcianojn	4480	(3817)
ĝeneralajn anojn	66	(101)
simpatiantajn anojn	8	(16)
simpatiantajn organizojn	32	(24)
Entute	4586	(3958)

Ni do kreskis per 568 anoj.

El la kursoj aliĝis, laŭ niaj esploroj, proksimume 1400 novaj anoj. Pli ol 700 anoj forfluis el nia organizo. En la antaŭa jaro tiu nombro estis proksimume 1000. Rajtas la demando: kio estas la kaŭzo, ke ĉiujare tiom multe da anoj forlasas la esperanto-movadon? Efektive ili ne plu valoras por la esperanto-movado, ĉar la praktiko montris, ke ili ne forlasis nian organizon por aliĝi al alia organizo. Ni eĉ konstatas ĉe la aliaj esperanto-organizoj la samon.
Ne ĉiuj lernantoj en la kursoj komprenas la neceson por, per aliĝo al organizo, plifortigi la esperanto-movadon. Estas diferenco inter la lingvo-studado kaj la laboro por la organizo. La kresko de nia organizo ne trovas subtenon rekte de el la neesperantista publiko sed nur el malgranda parto de ĝi, nome el tiu malgranda parto, kiu unue sekvis esperanto-kurson. Konsiderante ĉi flankon, ni povas kompreni la malfacilan organizan laboron. Ke malgraŭ tio, nia Federacio tamen kreskis sufiĉe grave, komparante la kreskon de aliaj esperanto-organizoj, estas ĝojiga fakto.
Sendube ankaŭ la kriza tempo grave influas. Multaj ja ne plu povas permesi al si eĉ malgrandan elspezon.
Meze de la jaro ni atingis preskaŭ la nombron de 4850 anoj. Poste do proksimume 300 anoj forlasis nin. Tio bezonas nian atenton.
Ni utiligu niajn spertojn por estonte ankoraŭ pliefike rikolti.
Jen la cifera komparo kun la antaŭaj jaroj:

Fine de	1936	la membronombro estas	4586
„ „	1935	„ „ estis	3958
„ „	1934	„ „ „	2887
„ „	1933	„ „ „	2321
„ „	1932	„ „ „	1965
„ „	1931	„ „ „	1561
„ „	1930	„ „ „	1133
„ „	1929	„ „ „	450
„ „	1928	„ „ „	166
„ „	1927	„ „ „	75

La ciferokomparo estas pri 10 jaroj. Okulfrape trafas la daŭra kaj sana kresko, kiu seninterrompe manifestas sin. Estas efektiva kerno, kiu esprimiĝis per ĉi tiu komparo. La interna forto de nia organizo do pliiĝas.

FEDERACIA APARATO

LA FEDERACIO-ESTRARO.

La estraro en la pasinta jaro ne ŝanĝiĝis. Ĝi kunvenis 24 fojojn. La estraranoj okupis sin same pri la diversaj fakoj kiel en la antaŭa jaro. Nur pro la eldono kaj redaktado de „La Vojo” ni devis trovi alian aranĝon. Pro tio la prizorgo de la ekspozicio-fako estas transprenita de la konsilantarano C. v. Essen el Rotterdam.
Pri la redaktado de „La Vojo” nun okupas sin k-dino Faulhaber. Antaŭe ŝi prizorgis la ekspozician materialon. Dum pluraj jaroj kdino Faulhaber okupis sin pri ĝi. Malfacila kaj temporaba laboro, sed daŭre kdino Faulhaber trovis ion novan interesan, daŭre ŝi plibonigis, renovigis kaj reordigis en kunlaboro kun ŝia edzo. Estas do klare, ke la fed.-estraro nur pro praktikaj motivoj decidis transdoni ĉi fakon en la manoj de alia prizorgonto. Ni tamen esperas, ke sub la kontrolo de kdo Van Essen la ekspozicia materialo trovu saman prizorgon. La ekspozicia materialo estas grava parto el nia propaganda municio.
La adminstracio de „La Vojo” estas en manoj de nia kasisto, kdo Koch, kiu do nun krom la administrado pri la aliaj eldonoj de nia Federacio okupas sin pri nia plej juna infano el niaj eldonaĵoj.
Ĉi tie ni esprimu dankon al kdino Smit el Groningen kiu unue prizorgis la administradon helpe de ŝia edzo kiu stencilis la organon.
Pro la daŭra kresko de nia Federacio la laboroj pli kaj pli ampleksiĝas. Ĉar same kiel antaŭe, la estraranoj devas ĉion fari en sia libera tempo, ne plu eblis prizorgi ĉion laŭregule. Ni decidis tial, ke kdo Prent dum la verda monato-periodo plene povu dediĉi sin al la necesaj laboroj kaj pro tio ricevis kompencon de f 20.— semajne. Ĉar antaŭ decembro nia Libro-Servanto, kdo Kroonder, pro profesia kromlaboro ne povas liberigi sin vespere por la Federacio, ni devis plilongigi tiun aranĝon ĝis la 6a de decembro. Montriĝis, ke la estraranoj ne plu povas fari la necesan laboron en la disponebla libera tempo, tial ni decidis prezenti al la Federacio-Konsilantaro proponon por solvi tiun problemon.
De unu el la sekcioj en Rotterdam venis protesto kontraŭ la dungo de kdo Prent, ĉar pri tio nek decidis la Fed.-Konsilantaro nek la kongreso. Sub la premo de la praktiko ni devis decidi pri tio aŭ riski ĥaosiĝon. El tio ni elektis por la Federacio la plej favoran decidon, kiun ni cetere ne bedaŭras, ĉar ĝi estis la nura solvo de la problemoj en kiuj ni baraktis pro amasiĝo de urĝaj laboroj por kiuj la libera tempo de la Federacio-estraro ne sufiĉis. Cetere ja la sekcioj *postulas* ke la Libro-Servo plenumas ĉiujn mendojn ĝustatempe.

LA FEDERACIOGAZETO L E.

Laborista Esperantisto, nia monata gazeto, aperadis regule kaj en la promesita amplekso. La jarkolekto 1936 nombris 146 paĝojn, t.e. 22 paĝoj pli ol en 1935.
Ankaŭ en la pasinta jaro ĉiuj membroj ricevis senpage Sennaciulo-n, la monatan organon de SAT.
La Federacianoj do ricevis 2 foje ĉiumonate organon, nacian kaj internacian, entute 242 paĝojn. Tial L E povis aperi grandparte nederlandlingve, propagandante inter ne-esperantistoj kaj komencantoj. Tio montriĝis tre grava, ĉar en la nuna vintro-sezono, ĉ. 2200 kursanoj abonis nian gazeton L E, por kio ni fiksas specialan favor-prezon de nur 25 cendoj por duonjaro.
Tio estas precize la preskosto, sed, pro la fakto, ke tiom granda parto el la kursanoj legas la Federacio-gazeton, la varbado ĉe la fino de la kursoj estas despli facila.
Tiam la kursanoj jam estas informitaj pri la organizo kaj la Esperanto-movado.
La eldonkvanto kreskadis ĝis **7400** ekzempleroj monate, per kio ni superas ĉiujn aliajn esperanto-gazetojn (5700 en 1935, kaj 4600 en 1934).
La lingvopaĝoj restis redaktataj de G. J. Degenkamp kaj Jac. Lem Jr.
Cetere ni klopodis liveri varian kaj informan legaĵon, ĉio tamen nur rilate al Esperanto kaj ĝia movado kaj pri nia organizo.
La gazeto-konfliktkomisiono ne bezonis funkcii. La redaktoro estis H. W. Alings, kiu verkis la nesignitan enhavon.

LA FEDERACIA KONSILANTARO.

kunvenis, same kiel la antaŭan jaron du fojojn. Unu kunveno okazis antaŭ la kongreso por i. a. priparoli la gvidliniojn rilate la kongresan tagordon, ktp. La alia kunveno okazis antaŭ la verda monato por atenti la propagandon. Tiel estiĝis efektiva interkontakto, per kiu ni povis havigi al ni juĝon pri la necesoj kaj ebloj en la diversaj lokoj de nia lingvo-regiono. La konsilantaranoj kunvenis kun la Federacio-estraro kiel kompleta Federacio-estraro.

LA PROVINCAJ DISTRIKTOJ.

plenumas la propagandan laboron en la resp. provincoj kaj cetere funkcias, kiel interliga instanco inter la sekcioj en la provinco. Ni povis konstati plivigliĝon en ĉiuj distriktoj. La koncernaj estraroj estis aktivaj kaj klopodis sur sia tereno kiel eble plej sukcese plenumi siajn taskojn. Ankaŭ en tiuj provincoj, kie nia Federacio ne estas ankoraŭ forte enplantiĝinta ni notis sukcesojn. Ju pli malgranda nia influo en iu distrikto, des pli malfacila la laboro. Tial ni ĝojas, ke ni spertis aktivan kunlaboron. Sistema laboro certigas sukceson. Ni ne forgesu tion. La praktiko montris, ke pli kaj pli oni inklinas eklerni nian lingvon. Kelkloke estis tre malfacile por solvi la problemojn, kiam oni turnas sin al ni por gvidantoj de esperanto-kursoj. La manko de kursgvidantoj en la malfortaj distriktoj estas plej ofte sentata. En la fortaj distriktoj oni ne tiel grave sentas tion. De ĉi tiu loko ni direktas nian honorsaluton al tiuj, kiuj oferas tempon kaj laboron por je granda distanco gvidi kursojn en la malproksimaj lokoj nur kontraŭ repago de vojaĝelspezoj. *Estas cetere konata fakto, ke en niaj rondoj ĉiu laboro rilate gvidadon de kursoj senpage estas farata. Same kiel sur ĉiu tereno de niaj laboroj, niaj anoj laboras por sia movado sen iu ajn mona rekompenco. Tion ankaŭ faris la verkistoj en nia Federacio.* Feliĉe la distriktoj pli kaj pli disponas pri tiaj kunlaborantoj. Sisteme ni plugas, sisteme ni siatempe rikoltu.

LA SEKCIOJ

montris preskaŭ senescepte kreskon. Ni povis bonvenigi *27 novajn sekciojn,* kelkaj en lokoj, kie ni ĝis nun ne povis enpenetri. Per la aliĝo de tiuj novaj sekcioj ni estonte pli bone povas plugi sur kampo ankoraŭ ne plugita de ni.
En Amsterdam *kreskis* la sekcioj de 787 anoj ĝis 931, en Rotterdam de 698 anoj ĝis 902, en Hago de 224 anoj ĝis 369.
Precipe en la malgrandaj lokoj ni konstatis, ke la kresko de la koncerna sekcio ne estas en tiel favora situacio, kiel de tiu en pli grandaj lokoj. La sekcioj, kiuj iom malkreskis estas precipe en malgrandaj lokoj.
Malkreskis sekcio Beets N.H., de 22 anoj ĝis 9, Bilthoven de 20 anoj ĝis 15; Breda (cetere ne malgranda loko) malkreskis de 37 anoj ĝis 20, Hillegom de 20 ĝis 11, sekcio Leiden decidis fondi 2an sekcion en Leiden, sed poste la nombro da anoj malkreskis de 39 anoj ĝis 31; Tessel malkreskis de 12 anoj ĝis 6; West-Graftdijk de 20 anoj ĝis 13; Zeist de 46 ĝis 32; Amsterdam VI de 25 anoj ĝis 14.

MENCIINDAN KRESKON MONTRIS:

Amsterdam V de 107 anoj ĝis 143; Amsterdam VII de 52 ĝis 78; Amsterdam X de 57 ĝis 84; Amsterdam XIV de 27 ĝis 41; Hago III de 37 ĝis 60; Hago IV de 70 anoj ĝis 97; Hago VI de 9 anoj ĝis 23; Hago IX de 41 ĝis 62; el Hago IV krome 24 eliris por fondi sekcion Xan; Rotterdam I de 89 anoj ĝis 122; Rotterdam II de 178 anoj ĝis 229; Rotterdam V restis preskaŭ samforta, tamen 24 anoj eliris por fondi Rotterdam XV; Rotterdam VII de 48 anoj ĝis 65; nova sekcio Rotterdam fondiĝis kun 42 anoj; Haarlem I de 32 anoj ĝis 51; fondiĝis nova sekcio en Haarlem kun 13 anoj; Amersfoort de 16 anoj ĝis 32; Arnhem de 39 anoj ĝis 52; Beverwijk de 30 anoj ĝis 41; Enschede de 27 anoj ĝis 37; en Gouda fondiĝis dua sekcio kun 11 anoj; Groningen de 59 anoj ĝis 68; Den Helder de 11 anoj ĝis 30; Hoorn de 6 anoj ĝis 14; Kerkrade de 9 anoj ĝis 18; Koog Zaandijk de 13 anoj ĝis 24; Leeuwarden de 56 anoj ĝis 72; Schaesberg de 6 anoj ĝis 15; Sliedrecht de 15 anoj ĝis 36; Utrecht I restis samforta, tamen fondiĝis novaj sekcioj II kun 25 anoj kaj Zuilen (Utrecht) kun 14 anoj; Vlaardingen de 22 anoj ĝis 30; Waubach de 5 anoj ĝis 13; IJmuiden de 50 anoj ĝis 66; Zwolle de 38 anoj ĝis 59 kaj la sekcioj en Belgio kune kreskis de 139 anoj ĝis 171.
La ceteraj sekcioj restis samfortaj aŭ kreskis nur per kelkaj anoj. Malgraŭ, ke la laboro en malgrandaj lokoj estas sendube malfacila kaj cetere la tereno ne tiel vasta kiel en pli grandaj lokoj, ni tamen povas konstati per ĉi supra komparo, ke eblas la kresko ankaŭ en malgrandaj lokoj.
Kiam ni verkis ĉi raporton ni ankoraŭ ne disponis pri iuj finaj ciferoj el la sekcioj, do povas esti, ke tiuj koncernaj sekcioj eble konstatas diferencon, tamen tiu diferenço ne povas estis grava.

LA KONGRESO

okazis en Den Haag. Ĝi estis jubilea kongreso, kiun vizitis 1250 partoprenantoj. Ankoraŭ freŝa estas la memoro pri ĉi tiu impona kongreso, kia ĝis nun ne okazis en nia lingvoregiono. Unu el la plej trafaj momentoj estis la transdono de la nova standardo, donaco de distrikto Rotterdam.
La bonega antaŭpreparo de niaj hagaj gekdoj certigis glatan funkciadon de ĉiuj koncernaj instancoj. Ke la hagaj gekdoj sukcesis bonorde ĉion aranĝi por ĉi tiu amaskongreso estas fakto, pro kiu ni ĉi tie rajtas esprimi ankoraŭfoje nian dankon. Multaj salutleteroj de el eksterlando kaj cetere el la laborista movado tiel el Nederlando kiel el Belgio trafis nian kongreson. Same estis reprezentantoj el diversaj instancoj de la laborista movado, el simpatiantaj organizoj kaj el oficialaj instancoj kiuj vizitis nian kongreson. Kiel gastoj de nia kongreso ĉeestis i.a. 2 el la fondintoj de la Federacio, kdoj J. L. Bruin kaj K. H. Meijer kaj la sekretario de SAT, kdo N. Bartelmes. La kongreso estis plena sukceso kaj sendube multe atribuis por la propagando de nia movado kaj la disvastiĝo de Esperanto ĝenerale.

LA LIBRO-SERVO.

Grava montriĝis esti nia Libro-Servo por la movado. La propraj eldonoj plimultiĝis denove sufiĉe grave, kaj la reeldono de kelkaj verkajoj necesis. Aparta raporto montras la rezultojn tiel pri la aranĝoj, kiel pri la financa flanko.

LA GAZETARSERVO.

Pli kaj pli montriĝas, ke en la diversaj distriktoj oni sukcesas enpresigi artikolojn kaj komunikojn en la lokaj gazetoj. Same kiel en la antaŭa jaro ni, se eble ĉiumonate, aperigis nian bultenon kun komunikoj por la gazetaro. Sed ĝi nur povas esti ĝenerala, ĉar ĝi servu por kiel plej multaj diversspecaj gazetoj. La koncernaj perantoj zorgu, ke ili sisteme provizas la koncernajn gazetojn. Bonajn raportojn ni ricevis de la distriktoj N. kaj Z.-Holando kaj pli malpli el Frizlando kaj Zelando. De la aliaj distriktoj ni ne ricevis informojn. En Rotterdam oni havis bonan sukceson en diversaj gravaj gazetoj.
Menciinda estas la sukceso ĉe „Arbeiderspers” kiu post nia tiurilata propono decidis aperigi „Esperanto-kolonon” ĉiusemajne du fojojn. En ĉi tiu raporto ni esprimas nian dankon al la diversaj gazetaro-prizorgantoj kaj perantoj, kiuj plenumas sian taskon kun tiom da sukceso.
Ni instigas ĉiujn distriktojn kaj sekciojn atenti ĉi flankon kaj klopodi enpenetri en sian resp. lokan gazetaron. Sisteme laboru por tio kaj sendube ni notos pli multajn sukcesojn. Nun jam ne plu eblas mencii ĉiujn gazetojn kaj ĉiujn, kiuj pli malpli regule laboras por la gazetarservo, sed multo ankoraŭ estas farota. En nia estraro ni konsideris alie organizi la gazetarservon kaj ni ankaŭ ricevis tiurilatan proponon de el Haarlem, tamen la praktikaj kaj teknikaj konsideroj igis nin ne ŝanĝi la nunan staton, ĉar pleje gravas la lokaj gazetoj kaj por ili necesas apartaj prizorgoj, kiuj estas treege temporabaj.
Ni ne plu sendis la bultenon de nia gazetarservo al ĉiuj sekcioj, ĉar tio postulas tro multe da laboro, sed ni sendis ĝin al la perantoj kaj gazetoj. La eldonkvanto estis proksimume 400 ekz.

LA PROPAGANDO.

Krom la ĝenerala propagando ĉiujare denove la „Verda Monato” (Septembro) estis la plej grava. Ni tamen konstatis, ke ĝi pli kaj pli estas konata ankaŭ de la publiko. La sekcioj raportis pri vigla laboro dum la verda monato. Ni eldonis specialan propagandafiŝon pentritan de kdo A. Langenberg en 5000 ekzempleroj, kiu afiŝo ne maltrafis sian celon. Tamen ni estas konvinkitaj, ke oni ankoraŭ pli povas atingi en la konstruaĵoj de niaj resp. parti- kaj sindikatinstancoj same en publikaj konstruaĵoj. Ni ne malatentu tion.
La faldfolieto en 100.000 ekzempleroj de ni eldonita estis trafa kaj altiris la atenton de la publiko, same la sigelmarkoj, eldonitaj en 100.000 ekz. trovis vastan debiton. La malgranda flugfolieto je malmultekosta prezo vendiĝis en kvanto de 850.000 ekz. (vidu la raporton de la Libro-Servo). La prezo de la propagandaĵoj estis intence malalta. La Fed.-kaso do pagis por la propagando la diferencon kaj afrankon. Entute tiu deficito estas ĉ f 300.—.
La broŝuro „Waarom Esperanto” de kdo Alings (10.000 ekz.) kaj „Esperanto en Arbeidersjeugd”, (5000 ekz.) de kdo Leerentveld atribuis multe al la propagando. La prezoj 3 kaj 2 cendoj estis precize la preskostoj. El tio ni ne povis konti financan profiton, tamen laŭ propaganda vidpunkto ili certe donas profiton al nia movado.
Diversaj sekcioj ricevas la propagando-materialon senpage aŭ duonpreze.
Cetere L E grave utilis por la propagando kaj same kiel en antaŭaj jaroj ni ankaŭ

ĉijare disponigas L E je malmultekosta prezo al la kursanoj.
Okazis 100 ekspozicioj kaj 80 prop. kunvenoj. Rezulto: 310 kursoj kun 3000 kursanoj kaj 1500 en daŭrigaj kursoj; 75 partoprenantoj en B-kursoj kaj 52 infankursoj kun 1000 partoprenantoj. Entute do 5600 kursanoj.
Regula senhalta propagando signifas semi kaj semadi konstante. Multe dependas de bone aranĝita propagando. Ni faris nian eblon por ebligi al ĉiuj niaj sekcioj fari bonan propagandon. La Federacio-estraro konsiders ĉiujn flankojn kaj laŭpove klopodis efektivigi siajn planojn.
La Fed.-estraro turnis sin per cirkulero al la sindikatoj kaj ceteraj unuiĝoj por instigi ilin aliĝi al la Fed. kiel simpatianta organizo. Malgraŭ ke tio ne estis tute senfrukta, tamen ni ne kontentiĝis pri la nombro de novaliĝoj. Estas necese, ke la koncernaj anoj klopodu efektivigi tion per proponoj al siaj resp. organizoj por aliĝi al la Federacio.

RADIO.

Gravaj por la propagando estas niaj radioelsendoj. En ĉi tiu jaro ni povis daŭrigi la elsendojn en kunlaboro kun VARA. Regule ĉiudekkvartage okazas la elsendoj, kiuj daŭras proksimume 20 minutojn. Diversaj parolantoj, ankaŭ konataj personoj el la laborista movado paroladis antaŭ la mikrofono.
Ni notis kiel parolintojn: kdon Degenkamp, kdinon Koch-Koopal, kdon Ponstein, kdon Veen, kdon Vrees kaj kdojn Krijt kaj Kernekamp por la dialogoj. La kanthoro „La Nova Tempo", kantis, cetere kantis antaŭ la mikrofono Jo Hekkert v. Eijsden kaj Jan Blok; okazis intervjuo fare de kdo Krijt kun Dr. Henri Polak kaj prezento de kaj por infanoj farita de la infangrupo „La Juna Espero" sub gvido de kdino Vrees, la teatraĵeton por tiu elsendo verkis kdino Faulhaber-Ĉiŝkovska. Menciinde ankaŭ estas, ke Ir. Damme, direktoro de la PTT pretis paroladi por ni antaŭ la mikrofono.
Ni esprimas per ĉi raporto nian dankon al VARA, kun kiu ni ankaŭ ĉijare tiel fruktedone kunlaboris por la prizorgo de la esperanto-elsendoj. Ni memorigu, ke estas nia laborista kaj la katolika radio-organizoj kiuj regule elsendas tiajn esperantaĵojn.

EKSPOZICIA FAKO.

La nombro de la okazintaj ekspozicioj en la pasinta jaro atestas, ke la sekcioj komprenas la valoron de tiu ĉi propaganda rimedo sciante, ke la publiko volas ne nur aŭdi pri utileco de Esperanto, sed ankaŭ vidi ĝian praktikan uzadon en diversaj fakoj de la soca vivo sur internacia tereno. Entute nia organzo okazigis 100 ekspoziciojn, parte per la federacia materialo, parte per tiu de la sekcioj. La Fed. posedas nun 8 kestojn kun materialo, inter kiuj unu servas tute por Flandrio. La pasinta jaro montris, ke eĉ tiu ĉi nombro ne sufiĉas por kontentigi ĉiujn petantojn en la propaganda sezono. Pro tio estas dezirinde, ke la urbaj distriktoj fondu propran ekspozician fakon, kiu servu al iliaj sekcioj. Distrikto Roterdamo jam eklaboris en tiu direkto.
Laŭ peto ni sendis esperantaĵojn al diversaj sekcioj kaj distriktoj, kiuj posedas propran propagandan servon kaj subtenante ilian laboron, ĝi daŭrigas en eldonado de cirkularoj, kiuj informas pri novaj esp.-eldonaĵoj, senpage riceveblaj.
La ekspozician fakon prizorgis kdino E. Faulhaber, ano de la Fed.-estraro.

LA EKZAMENOJ.

En kunlaboro kun LEEN ni ĉi jaro daŭrigis nian laboron en la ekzamena komitato. Ni ne sukcesis akiri ŝtatan reprezentanton en niaj ekzamenoj, tamen ni denove turnis nin al la ministro.
La samaj anoj reprezentis nian Federacion en la komitato kaj ne okazis ŝanĝo.
Detalan raporton ni siatempe povas atendi de la komitato mem.

NIA STUDORGANO: LA PROGRESANTO.

En novembro komenciĝis la tria jaro de tiu ĉi studo-organo, kiu havis ĉ 750 abonantojn. Konsiderante, ke ofte unu abono servas al pli da personoj, kiuj ne povas pagi la tutan abonsumon, ni konkludas, ke la nombro da studantoj estas pli alta.
Ankoraŭ ne eblas, ke la senditaj tradukoj estas individue korektataj. La kamaradoj, kiuj prizorgas la redaktadon ne disponas pri sufiĉe da tempo, ĉar ili estas plene okupitaj pri ĉiaj aliaj laboroj en siaj sekcioj aŭ en la federacio. Tamen „La Progresanto" plenumas gravan bezonon, kaj estas ŝatata ankaŭ ekster nia federacio.
Pere de L P ni povas observi la lingvan nivelon de la esperantistaro kaj ekscii laŭ kiuj specialaj temoj estas necese direkti la instruadon kaj informadon. Sennombraj estas la lingvaj demandoj de studantoj kaj kursgvidantoj, demandoj, kiuj ofte devas esti skribe respondataj.
Dank' al nia studo-organo kaj la ceteraj lingvaj eldonoj de nia Federacio, ni ĉiel konstatas en niaj laboristaj rondoj grandan interesiĝon pri la lingvo mem. Tio estas ĝojiga fakto, kiu influas ankaŭ la rezultojn de la ekzamenoj en la jaro pasinta.

NIA INFANGAZETO: LA VOJO.

Post multpromesanta pionira laboro, farita de kdino L. Tillema-Heynen (redakcio) kaj gekdoj Smit (admnistracio) venis komence de la j. 1936 kriza tempo por nia infangazeto. Ĝi estis kaŭzita pro tio, ke tuta zorgo pri „La Vojo" kuŝis de oktobro 1935 sur la ŝultroj de gekdoj Smit, ĉar kdino fine eksiĝis el sia funkcio.
T.-H. ne povis okupi sin pri redaktado kaj je fino de januaro 1936 transprenis ŝian taskon kdino E. Faulhaber, helpata de gekdoj Smit, kiuj daŭrigis la administradon. Por ilustrado de la gazeto zorgis kdo G. J. Degenkamp. Septembro 1936 alportis gravan ŝanĝon en la historio de nia infangazeto. „La Vojo" estas presita kaj en ĝi aperas lecionoj el Esperanto-lernolibreto por infanoj, verkita de kdino A. Rebers, ilustrita de kdo J. Langeberg. La administradon prizorgas gekdoj Koch.
En januaro 1936 havis L V 230 abonantojn, je fino de decembro 900 da ili.

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ.

Rilate la celon „Esperanto en la lernejo", jam multe estas dirita, kaj efektive estas unu el la plej gravaj problemoj. Estas tereno tute aparta kaj dependa de diversflanka lojala kaj celkonscia laboro. Ne nur estas tereno, kiu apartenas al la laborista movado, sed devas partopreni en la laboroj oficialaj instancoj kaj la registaro. La unuaj klopodoj do estas jam tre gravaj. Efektive montriĝis, ke la intereso ĉe la gepatroj de la infanoj estas jam sufiĉe vekata. Nia amsterdama distrikto, kiu ekz. okupis sin pri tio kaj klopodis starigi esperanto-kursojn por la infanoj en diversaj lernejoj spertis la intereson ĉe la gepatroj, sed ĝi ankaŭ spertis, ke la lernejoj ne disponas pri instruistoj (profesiaj), kiuj povas instrui esperanton. La kursoj, kiuj stariĝis, do estas gvidataj de neprofesiaj instruantoj.
Alia spertiga laboro estas la laboro de la infankomitato (pri kiu vi aliloke trovas raporton) per kiu ni speciale en la kadro de nia Federacio okupas nin pri la instruo de esperanto al la infanoj. La celo de tiu komitato ne nur estas la instruo al infanoj, sed ankaŭ por trovi la manieron, per kiu ni povas ligi la infanojn al nia movado kaj interesigi ilin pri la praktika valoro de esperanto.
En kunlaboro kun aliaj landaj esperanto-organizoj ni antaŭ kelkaj jaroj starigis komitaton kun la celo enkonduki esperanton en la lernejo. La nura konkreta fakto, kiu atestas pri la laboroj de tiu komitato estas la broŝuro: „Esperanto op de scholen". Cetere la komitato praktike mortis. Nun ni denove en kunlaboro kun aliaj organizoj daŭrigos tiujn laborojn, sed tamen plisisteme. La tasko estu funkciigi ian aparaton, per kiu ni povas havigi al ni la necesajn informojn kaj ankaŭ la materialon per kiu ni devos pruvi la rajton kaj neceson instrui esperanton al la infanoj en la lernejoj.
Ne nur valoras la intereso de la gepatroj kaj la publiko por tiu celo, sed ankaŭ valoras la instruistaro, kiu siatempe devos okupi sin pri la instruo. La komitato ankoraŭ ne estas starigita, sed la interkontakto inter la landaj esperanto-organizoj kaj la instruistaj sindikatoj jam okazis kaj tre evidente tiu plano en proksima tempo realiĝos.

SAT.

Same kiel en la antaŭa jaro la interrilatoj kun SAT estas kontentigaj.
Ĉiuj niaj anoj ricevis senpage la organon „Sennaciulo"n kaj per tio estiĝas la konkreta kontakto kun la tuta mondo. Estas altvalora aranĝo, kiu sendube atribuas multflanke al la kontentiĝo sopirata de niaj anoj pro sia esperantistiĝo.
La strukturo de SAT ankoraŭ estas multe atakata de el ekster SAT-ronda laborista esperantomovado, kiu certigas, ke strukturo laŭ nacia formiĝo, do la t.n. strukturo de „Internacio, konsistanta el naciaj organizoj" estas supera al la strukturo de SAT, kiu aplikas la individuan membrecon nekonsiderante la naciajn formiĝojn. Ni tamen demandas kian valoron havas la membrecon de anoj, kiuj eĉ ne deziras ĉu pro indiferenteco ĉu pro aliaj motivoj iel aktive partopreni en la laboroj de „mondorganizo" aŭ „internacio"? Nur praktike valora estas la montra kaj aktiva aĝo de la individuoj, kiuj iel montras tion. Surpaperaj anoj ne havas valoron por nia movado kaj ankaŭ efektive ne influas, kiel la praktiko montris. Kiam ni komparas la praktikan valoron de SAT kun tiu de la internacioj, ni konstatis la faktojn, ke nur SAT sukcesis plenumi sian taskon. Estis SAT, kiu regule aperigis siajn organojn. Pri la „internaciaj" laboristaj esperanto-organizoj oni ne povas raporti tion.
En la SAT-kongreso la Federacio estis reprezentata de kdo Prent. Ankaŭ kdo Veen, kiu tamen je propra kosto partoprenis la kongreson, havis mandaton en okazo de neceso prezenti la Federacion. Li salutparolis por la Federacio en la festvespero.

KALENDARO.

Laŭ kongresa decido ni eldonis esperantan kalendaron. Kdo B. Wels projektis tekstojn por taga kalendaro. Ĉar ni ne havas spertojn pri eldono de kalendaro kaj cetere estas temporaba afero ni klopodis aranĝi tion riskante kiel eble plejmalmulte. Pro tio eldoniĝis semajna kalendaro. Antaŭmendta estis kvanto de proksimume 600 ekz.

DIVERSAĴOJ.

Subfosa laboro.

La Fed.-estraro havis konferencojn i.a. kun IFETT-ITF (Internacia Transportista Federacio kaj la esperantista subinstanco), kun IvAO (Instituto por laborista klerigado) kun SDAP (Soc. Dem. Lab. Partio) kaj reprezentantoj de diversaj Instruisto-Sindikatoj.
En la IFETT-movado (sekcio holanda) okazis kunveno en kiu oni akceptis decidon, pro kiu niaj koncernantaj fakaj sekcioj ne plu povus esti sekcioj de la Federacio. Ĉar efektive la laboro kaj influo de niaj fakaj sekcioj grave influis la IFETT-movadon, kiu ankaŭ precipe pro la disvastiĝo kaj laboroj de nia Federacio en Nederlando trovis gravan subtenon, ni ne povis konsenti pri tiu decido en kunveno, kiu estis vera ignoro de nia Federacio en ĉi tiu por

nia movado principa afero. Ni sukcesis trovi interkonsenton, pro kiu eblas, ke niaj fakaj sekcioj povas resti kaj novaj fakaj sekcioj povas esti akceptataj. Montriĝis, ke la ignoro ne konscie estis farata. Rilate novajn aranĝojn en la IFETT (sekcio holanda) ni daŭre restos informataj kaj niaj konsideroj estos atentataj.
Pro miskreditigaj informoj flanke de novfondita ISE sekcio (SELN) pri nia Federacio, ni sendis amasproteston al SDAP kaj NVV (Soc. Dem. Lab. Parto kaj Nederlanda ligo de Sindikatoj), per kiu la anoj de SDAP kaj NVV en nia Federacio direktis sin kontraŭ SELN kun la atentigo, ke ili kiel anoj de la nomitaj organizoj plene subtenas la Federacion. Sekve la koncernaj estraroj ne agnosku SELN. En du semajnoj estis kolektitaj preskaŭ 2000 subskriboj kontraŭ la SELN-agado.
Pro tiu agado nia estraro konferencis kun la estraroj de la IvAO kaj de SDAP.
Hontiga por SELN estas la certigo de SELN (la kalumnioj pri sampartianoj, kiuj jam dum dekoj da jaroj laboradas en partio kaj sindikato) ke la Federacio kaj SAT sin direktas kontraŭ la t.n. moderna laborista movado (moderna = apartenanta al la dua internacio). La estraro de NVV informis nin, ke ĝi atentas la aferon.
Skribe ni turnis nin al la estraro de la Centrale Bond van Transportarbeiders (Transportlaborista sindikato), kies prezidanto en la kongreso de la sindikato, i. a. diris, ke en nia Federacio oni direktas sin kontraŭ la sindikato kaj ĝiaj estraranoj, kaj ni petis informojn, klarigante, ke ne ekzistas bazo por tiu certigo.
Montriĝis ke SELN kaj ties sekcioj direktis sin per tia kalumniado al diversaj instancoj same al VARA kaj Arbeiderspers, sciante ke Federacio-estraranoj-sampartianoj prizorgas la radioelsendojn ĉe VARA kaj la Esperantorubrikon en la Arbeiderspers. Feliĉe ni povis konstati, ke ĝenerale SELN ne renkontis en la gvidaj instancoj aprobon nek akcepton.

La kampadsemajno
projektita laŭ kongresa decido ne povis okazi pro nesufiĉa partopreno.

Interkontaktilo
estis sendita al la sekciaj estraroj kaj ceteraj funkciuloj por servi kiel informilo pri organizaj aferoj, kiuj ne povas esti detale pritraktataj en L E. En ĉi jaro ĝi aperis 7 fojojn.

Historia ekspozicio
okazis dum la kongreso en Hago. Ĉi tiu ekspozicio estis aranĝita sub gvido de kdino E. Faulhaber kaj G. P. de Bruin kiuj sukcesis kolekti interesan kaj maloftan materialon.

Nia Federacio estis reprezentita
en la Tutmonda Junulara Kongreso en Ĝenevo, kiu kongreso okazis en Septembro. Kdo Muusses el Purmerend, kiu intencis viziti ĉi tiun kongreson, prezentis sin por tio. La fed.-estraro akceptis. Bedaŭrinde, ni poste ricevis la raporton el kiu ni konstatis, ke ne estis permesata paroli ĉar la Federacio ne estas junular-organizo. La reprezentinto partoprenis proprakoste tiun kongreson.

Al Wuppertal
ni sendis laŭ kongresa decido leteron protestcele pri la konata proceso.

La laborista olimpiado
okazonta en 1937 havis nian atenton. Ni havas kontakton kun la koncerna komitato pere de nia Antwerpena sekcio, kiu okupas sin pri la necesaj aranĝoj poresperantistaj dum la olimpiado.

La vojaĝo al SAT-kongreso
estis komence prizorgata de la SAT-peranto, kiu poste petis al ni transpreni tiun taskon. La vojaĝo sub gvido de kdo Bultemeyer bone sukcesis; partoprenis 17 gekdoj.

RESUMAĴO.
Nia Federacio daŭrigis sukcesplene sian laboron, ni pli kaj pli enpenetras. La influo de nia agado estas senescepte ĉie sentata. En partioj kaj sindikatoj oni pli atentas al esperanto ol antaŭe. Nia Federacio plenumas sian taskon por la laborista klaso konscie kaj celtrafe. Ne estas kaŭzoj por ŝanĝi niajn principajn gvidliniojn. Kompare kun aliaj esperanto-organizoj ni rajtas fieri pri niaj laboroj kaj sukcesoj. La aparato de la Federacio fariĝas pliperfekta kaj ĝi povas servi al pligravaj postuloj de — kaj petoj direktitaj al la laborista esperantomovado. Ni estu singardaj, ke tio, kion ni en multaj jaroj konstruis povas esti frakasita en mallonga tempo, sed ni konsciu pri tio, ke rekonstrui ion tian postulos denove jarojn de seninterrompa laborego. Ni gardu nian Federacion kontraŭ atakoj, kiuj celas miskreditigi ĝin kaj se eble rompi la influon, kiun ĝi jam akris en la laborista movado.
Ni streĉu niajn fortojn por plifortigi kaj pliperfektigi la aparaton de nia Federacio. Ni agu organize kaj ne ekster la kadro de nia Federacio. En la Federacio ni havas ĉiujn niajn taskojn, estas laboro por ĉiuj. Ago kaj laboro kondukas nin al nia celo pere de nia Federacio.
Ni atentu la laborterenon, kiun ni havas kiel anoj de partio kaj sindikato por propagandi esperanton, instigi al aplikado de esperanto en la praktikaj laboroj. Ni estas sur la bona vojo, tion montras la praktiko kaj de neniu ni lasas forpuŝi nin de tiu vojo.
Ni finas ĉi tiun raporton esprimante bondezirojn por la nova jaro al ĉiuj niaj anoj kaj kunlaborantoj, ke la jaro 1937 trovu nin pli fortaj kaj spertaj por plenumi la taskon, kiun ni kiel laboristaj esperantistoj akceptis kaj ekkonis kiel altvaloran por la tutmonda laboristaro. Fed.-sekretario.

RAPORTO DE LA INFANKOMITATO.
Post ĝia ankoraŭ mallonga ekzistado la IK konvinkiĝis, ke ankoraŭ multega laboro devos efektiviĝi antaŭ ol ni fruktedone povos prilabori kaj disvastigi Esperanton inter la junularo. La ĝisnunaj klopodoj restis grandparte senrezultaj, unuaflanke ĉar mankas la plej necesaj lerniloj, aliflanke post la kursoj ofte oni ne posedis la rimedojn por teni kaj logi la infanojn en niaj vicoj. Krom tio ankoraŭ pli da energio kaj persistemo kaj pedogagio estas postulata de la gvidantoj kiuj instruas infanojn, ol de tiuj, kiuj instruas la plenkreskularon.

„La Vojo."
Post la starigo de I K eldoniĝis presita „La Vojo" en kiu kurso porinfana internacie uzebla. Por faciligi la taskon de la gvidantoj la verkantino de „La malgranda mondo" verkis gvidilon pri tiu kurso. Por varbi abonantojn kaj por sciigi al eksterlando pri internacia kurso, estas senditaj al diversaj Esp.-gazetoj artikolon, titolita „Solvita problemo", por enpresigi en ĝia eldonaĵo.

Pri kursoj en Nederlando.
El la ĝis nun ricevitaj informoj montriĝas, ke pli ol 950 infanoj partoprenas kurson, ± 800 infanoj estas instruataj laŭ kurso el „La Vojo". 150 infanoj ricevas instruon laŭ aliaj projektoj. Amsterdamo kaj Harlemo instruas la junularon en lernejĉambroj, pri kiuj ili povas disponi post la devigaj lernejhoroj el kiu Harlemo senpage ricevis la uzadon de la solono(j). En la aliaj urboj kaj urbetoj oni aranĝis la kursojn ĉu en la salonoj de la sekcioj, ĉu en ejoj de simpatiantaj organizoj. Ĝis nun fondiĝis 6 infangrupoj el infanoj kiuj jam eklernis Esperanton en 1934-1935.

La taskoj inter la komitatanoj.
Kdino Faulhaber (redaktorino), kdoj H. J. Nieuwenhuizen (asesoro), D. Captein kaj H. Varkevisser pristudas infanlaboron en Hago, krom tio kdo Nieuwenhuizen testos kaj kritikos infanrakontojn ktp por poste ilin eldoni. Kdino C. de Cock kritikos la kurson el LV kaj rakontojn ktp. Roterdamo, gekdoj A. C. Obbes asesorino, gvidas Nederlandlingvan kurson por infankursgvidantoj, kaj kritikos ankaŭ materialon el L V. Kdo J. Snel, prez. okupas sin pri ekspozicia fako porinfana, krom tio en Roterdamo vizitos la kursojn, tiele kompilante raporton pri ili kaj W. Borsje prizorgas sekretarian laboron.
Ni ekspedis: 160 leterojn al eksterlando; 96 leterojn en nia lando.
Ni ricevis: 19 respondojn el eksterlando. 85 respondojn el nia lando.
Leteroj al eksterlando enhavis petojn pri kunlaboro. Respondoj el eksterlando estos preskaŭ senrezultaj.
„Voorwaarts", „Tribune" kaj „Dagblad van Rotterdam" enpresigis kelkfoje artikolon pri nia laboro inter la junularo.
En Roterdamo la I K organizis pedogagian kurson sub gvidado de kdino A. Rebers.
La 16an de majo stariĝis la I K, poste la sekretario du foje kunvenis kun geedzoj Faulhaber kaj kdo Alings.
La estraro de la I K 3 foje kunvenis.
W. Borsje, sekretario.



9 Jan.: 1. La Espero. 2. Parolado de P. K. Polderman. (Sekr. Instituto por Laborista Klerigado.) Temo: „Laborista klerigado kaj Esperanto."

23 Jan.: 1. La Espero. 2. Kees Pruis, konata holanda humoristo, kantas.

La elsendtempo estas regule 20 minutoj kaj okazas proks. je la 5a horo M.E.T. ĉe VARA, Hilversum.

Mededelingen van het O. K. K.
Nog slechts drie maanden scheiden ons van het Kongres!
Het Gentse OKK is volop aan het werk opdat alles op tijd klaar weze. Kongresontoj, aarzelt niet u van nu af aan te geven voor:

a. verblijf hotel of kosteloos.
b. Deelneming gemeenschappelijke maaltijden.
c. deelneming interfratiĝvespero.

Bedenkt dat zulks niet alleen ons het werk vergemakkelijkt, maar dat het tevens in uw voordeel is zo ge ons nog heden schrijft wat ge wenst dat er voor u geregeld wordt. Dus: stelt niet uit tot morgen wat ge nog heden doen kunt.

Het volledig programma van feestavond en kongresdagen zal in het eerstvolgend nummer van L E verschijnen.
We kunnen van nu af reeds meedelen dat de interfratiĝvespero iets puiks wordt. Ook wordt er voor iedere kongresonto voor een verrassing gezorgd.

ONZE INTERNATIONALE VAKBEWEGING.

Voor een der vakverenigingsafdelingen in Amsterdam hield Edo Fimmen, sekretaris van de I.T.F., een lezing over „Het I.V.V. gister, vandaag en morgen." Om meer dan één reden heb ik met genoegen naar de lezing van kameraad Fimmen geluisterd. Van de gelegenheid om naar aanleiding van het gesprokene nog iets te zeggen, heb ik gebruik gemaakt om o.m. ook de aandacht te vestigen op het nut, dat de toepassing van het Esperanto voor de internationale vakbeweging kan hebben. Uiteraard was de tijd te beperkt om hierover veel uit te weiden. Deze rede was echter bij uitstek geschikt om de aandacht te vestigen op de absolute noodzakelijkheid van een wereldtaal (dus van Esperanto) voor de internationale toenadering, een gebiedende eis voor een vruchtdragende internationale vakbeweging. Uit de rede vermeld ik de punten, die rechtstreeks dit probleem raken, om hieraan een beschouwing vast te knopen, hetgeen wegens gebrek aan spreektijd slechts zeer oppervlakkig in de vergadering kon gebeuren.

Fimmen dan wees op het gebrek aan voeling tussen de nationale eenheden. Immers de leden zelf zijn zich nauwelijks bewust van het bestaan van het IVV, ze weten zich geen onderdeel van het geheel. Er bestaat een band tussen de nationale vakbonden, die zich door de practijk ontwikkeld heeft. De vakbeweging in de verschillende landen voelden meer en meer de noodzakelijkheid van elkaars doen en laten op de hoogte te zijn en zo nodig in de verschillende landen de werkzaamheden te richten naar elkaars belangen. Het is echter een feit, dat vooral in de beginne de ontwikkelde activiteit slechts een miniem resultaat afwierp. Elke actie bleef beperkt tot besprekingen (dus van de vertegenwoordigers).

Het was de practijk, die hierin verandering bracht. De oorlog van 1914-1918 bracht na vele en moeilijke pogingen om de stukken weer bij elkaar te brengen, een ommekeer. Zonder veel getheoretiseer aanvaardde men een veel radicaler standpunt, waarin men zich o.a. ook uitsprak tegen de oorlog.

De internationale vakbeweging ging 'n periode van nog niet gekende activiteit tegemoet, waarin de internationale solidariteit een grote rol speelde. Toch zegt Fimmen tot de conclusie te komen, dat de werkelijke internationale solidariteit slaapt. Wij zijn helaas niet bij machte deze internationale solidariteit thans aktief te maken. De arbeiders denken aan eigen persoonlijke belangen, blijven in het nationalistisch raam. De Italiaanse en Duitse invloeden doen zich gelden. Een groot gevaar schuilt in het nationalisme, in het fascisme. Gebrek aan saamhorigheidsgevoel doet de rest.

De oplossing voor de internationale vakbeweging is het prijsgeven der autonomie van de nationale vakbonden en te komen tot centralisatie van beroepssecretariaten. Op dit terrein vinden wij ook een betere mogelijkheid tot gemeenschappelijke actie. De internationale vakbeweging zal onder ogen moeten zien, dat de goedkope arbeidskrachten in zekere landen, w.o. in de eerste plaats Japan en China, druk zullen oefenen op andere landen. Wij moeten komen tot een samengaan van arbeiders uit alle landen, ongeacht hun huidskleur. Nationaliteiten en rassen zullen samen moeten vloeien tot één krachtig geheel in de internationale vakbeweging.

Aldus in 't kort de punten, die voor dit artikel van belang zijn. De gedocumenteerde rede bevatte natuurlijk veel meer. Waar ik echter de aandacht op wil vestigen is dit, dat deze gehele rede zo bij uitstek een pleidooi was voor de verbreiding en toepassing van Esp. in de internationale vakbeweging, ondanks spreker met geen woord hierop zinspeelde.

Hoewel wij in onze arbeiders-esperanto-beweging niet ontevreden zijn over de resultaten van de laatste jaren, moet mij toch van 't hart, dat de internationale (dus ook nationale) arbeidersbeweging nog zo heel weinig belangstelling toont voor Esperanto. Dit ligt toch waarlijk niet aan onze Federatie, voor zover het Nederland betreft, en ook niet aan SAT, de enige Esperanto-organisatie op internationaal terrein, wier periodieken regelmatig verschijnen.

Om echter het slapende internationale saamhorigheidsgevoel te wekken is méér nodig dan resoluties en mooie woorden. Men moet het ook kunnen aanvoelen en het maken tot werkelijkheid door het leren en toepassen van Esperanto. Een krant in Esperanto geredigeerd door onze spaanse kameraden, in duizenden exemplaren verspreid over gans de aardbol, wekt een solidaritietsgevoel dat ver uitgaat boven de dagelijkse berichten in de nationale bladen. Het uitwisselen van gedachten, ideeën, enz. door esperanto, hetzij door correspondentie, hetzij mondeling, van blank tot bruin e.a. ruimt veel op, dat tot op heden een hinderpaal bleek te zijn voor toenadering. Dit is de practijk en geen utopie.

